**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 11

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** ␣ **a f** ␣ donas sian lanon, por ke mastro havu panon.

**2.** Mia loĝejo – mia ␣ **e ĝ** ␣ ␣ ␣.

**3.** Per pacienco kaj fervoro ␣ ␣ **kc** ␣ **s** ␣ ␣ ĉiu laboro.

**4.** Se juneco estus sperta, se maljuneco estus ␣ ␣ **rt** ␣!

**5.** En 1938 oni fermis la ␣ **i** ␣ **o**␣ ␣ inter Pollando kaj la Gdanska Libera Urbo.

**6.** Semajnfine, dum Ned **t** ␣ **nd** ␣ ␣ unu el siaj grandaj gazonoj, li sentis doloron en la brusto.

**7.** Sur la muro ␣ ␣ **nd** ␣ ␣ malhela pejzaĝo, kiu prezentis someran ŝtormon en senfina kamparo.

**8.** Plej granda EU-lando estas Germanio, kie loĝas pli multaj homoj ol en la dek plej malgrandaj ␣ **t** ␣ **t** ␣ ␣ kune.

**9.** Marta diris la nomon de la strato kaj la ␣ **u**␣ ␣ **r** ␣ ␣ de la domo, en kiu ŝi loĝis.

**10.** Baldaŭ Roerich realigis sian revon – ␣ ␣ **z** ␣ **t** ␣ Hindion, sed lia vojaĝo ne estis longa.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** Mi petas, sinjoro, la **ŝ** ␣ ␣ **s** ␣ **l** ␣ ␣ de la loĝejo, kiun mi luis antaŭ du tagoj.

**2.** La proprietulo malpermesis al la dungitoj **p** ␣ ␣ **m** ␣ **n** ␣ en la ĉirkaŭaĵo kaj kontakti nekonatojn.

**3.** Se la afero koncernus instruadon efektive komencan, mi estus eble **k** ␣ **p** ␣ **b** ␣ ␣ plenumi la taskon.

**4.** La ideoj de Zamenhof havis certan parencecon kun ideoj **s** ␣ **m** ␣ **l** ␣ ␣, esprimitaj de la granda rusa verkisto L. N. Tolstoj.

**5.** Finfine deputitoj nuligis la decidon de la tribunalo kontraŭ Zog la 2a kaj **i** ␣ **v** ␣ **t** ␣ ␣ lin reveni al Albanio.

**6.** Amase dissemataj mensogoj kaj kalumnioj arte kreas **t** ␣ **r** ␣ **r** ␣ ␣ malamon inter unuj gentoj kaj aliaj.

**7.** La programoj aŭdiĝas de **l** ␣ ␣ **d** ␣ ĝis vendredo de la 19a horo ĝis la 9a.

**8.** Antaŭ kelkaj monatoj la brita **p** ␣ **ŝ** ␣ ␣ eldonis poŝtmarkaron pri flagoj.

**9.** **L** ␣ **ĝ** ␣ ␣, kiu almenaŭ teorie permesas al ŝtatestro kaprice persekuti ĵurnaliston, eblas interpreti diversmaniere.

**10.** Paŭlo kuris al la bufedo kaj alportis al mi tason da kafo kun **k** ␣ **k** ␣, kiun mi amas.

**Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

amuz', decid', muzik', bov', kafej', saĝ', poŝ', prepar', kurac', instru' .

**1.** Tio ĉi estis la kranio de Jorik, la ␣ **m** ␣ ␣ ␣ **s** ␣ ␣ de la reĝo.

**2.** Aero, suno, spaco, jen estas la solaj ␣ ␣ **r** ␣ ␣ ␣ **l** ␣ ␣, kiujn bezonas la sinjorino.

**3.** Viaj vortoj estas vortoj de l' ␣ ␣ **ĝ** ␣ **l** ␣, kiu solvas plej malfacilajn kalkulojn – diris Amon.

**4.** Luka Lukiĉ, kiel inspektoro de lernejoj, devus ekzorgi precipe rilate la ␣ ␣ ␣ ␣ **r** ␣ ␣ ␣ **t** ␣ ␣ ␣.

**5.** Hotelo Sahara havis unu por li evidentegan kaj ␣ ␣ **c** ␣ ␣ ␣ **g** ␣ ␣ avantaĝon – ĝi estis plene klimatigita.

**6.** La ĉefaj risko-faktoroj de divastiĝo de viruso de hepatito estas transfuzado de infektita sango kaj sangodevenaj ␣ ␣ ␣ **p** ␣ ␣ ␣ **ĵ** ␣ ␣.

**7.** La knabo gajninte, avide kaptas la monon kaj tuj ␣ **n** ␣ ␣ **ŝ** ␣ **g** ␣ ␣ ĝin.

**8.** En ŝia universitato studentoj devas lerni ĉiujn tradiciajn ␣ ␣ **z** ␣ ␣ ␣ **l** ␣ ␣ ␣.

**9.** Promenante sur la stratoj oni povas vidi malnovajn konstruaĵojn, belegajn ␣ ␣ **f** ␣ **j** ␣ ␣ ␣ kaj restoraciojn, ktp.

**10.** Baldaŭ venis al la faraono nova malfortiĝo kaj por venki ĝin la kuracistoj devigis lin trinki freŝan sangon de ␣ ␣**v**␣ **d** ␣ ␣.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** Matene, tuj post la unua kanto de la ___, ĉiutage la pastroj vekis la monarĥon per himno, honoranta la leviĝantan sunon.

**a.** seĝo **b.** kaŭzo **c.** koko **d.** orelo

**2.** Miaj genepoj povas glitkuri ofte nur en stadiono kun artefarita ___.

**a.** gazeto **b.** glacio **c.** besto **d.** floro

**3.** Dum Ned kuŝis sur klinika ___, flegistino fiksis plurajn konektilojn sur lian bruston.

**a.** benko **b.** kato **c.** ligno **d.** plumo

**4.** En la mezo de la strato ondis seninterrompa ĉeno de komercaĵoj, portataj de homoj, ___ aŭ bovoj, jungitaj al veturiloj.

**a.** rozoj **b.** korpoj **c.** ŝtonoj **d.** azenoj

**5.** Ĉiuj religioj havas ___ rajtojn, kaj ĉiu familio povas havi religion, kiun ĝi volas.

**a.** lacajn **b.** dikajn **c.** egalajn **d.** utilajn

**6.** La reĝidino tuj ekvidis, ke la nova veninto estas tute alia persono, ol ĉiuj ___.

**a.** tenoraj **b.** ceteraj **c.** rapidaj **d.** gazetaj

**7.** Por ___ sin kontraŭ troaj superakvoj, ili konstruis potencajn digojn kaj fosis akvujojn.

**a.** ripozi **b.** tranĉi **c.** gardi **d.** opinii

**8.** La publiko forlasis la suprajn ___ kaj iris malsupren, puŝante unuj aliajn en la trairoj.

**a.** vintrojn **b.** ŝtonojn **c.** specojn **d.** benkojn

**9.** Ili prenis la monon, kiun Johano donis al ili, ___ lin pro lia bonkoreco kaj foriris.

**a.** mokis rifuzis **c.** silentis **d.** lavis

**10.** En la kamparo, tra kiu mi ĵus pasis, oni ___ porkon al la estro.

**a.** ludis **b.** ŝtelis **c.** koleris **d.** batalis